# PARIZA FEDERACIO

FEDERATION PARISIENNE des CENTRES CULTURELS "ESPERANTO"

CCP 10482-04 Paris 34, rue de Chabrol PARIS -10° tel.770-55-03

JANUARO - FEBRUARO 1973 N° 3

## 1 9 7 3

### B O N N E A N N E E

Ce changement de millésime me donne l' avantage de souhaiter une bonne année à tous les amis de l' ESPERANTO - c' est -à - dire à tous ceux qui, sans avoir appris cette Langue Internationale - sont convaincus de sa grande valeur et de sa nécessité.

Merci pour leur précieux soutien. Puisse leur nombre grandir. Dans notre monde moderne il faut, pour réussir, montrer la force du nombre. C' est là une loi inéluctable. Aussi êtes - vous tous invités à faire autour de vous une tenace et fructueuse propagande.

Roger D E S P I N E Y

### B O N A N J A R O N

Al la komencantoj - Se vi komencas la lernadon de ESPERANTO, mi bondeziras al vi kuraĝon dum la tuta jaro.....kaj poste!

ESPERANTO estas pli simpla ol la aliaj lingvoj... Tamen , sen laboro oni ne povas sukcesi.

Do ! .... Bonan kuraĝon !

---

Al ĉiuj esperantistoj de la Pariza Federacio mi bondeziras bonan jaron ! Ke pli kaj pli senĉese ili laboru kuraĝe kaj sindoneme , ĉiam serĉante precipe tion, kio unuigas, ol tion, kio malunuigas.

### T R I R E Ĝ A K U K O - K U N V E N O

VENDREDO 12 an de JANUARO 1 9 7 3 a je la 19 a - 34, rue de Chabrol- Paris

---

Lastjare tiu kunveno estis vera sukceso. La venonta estos NEFORGESEBLA !!!

---

Inscription préalable :34, r. de Chabrol par lettre ou par téléphone tous les matins sauf dimanche et lundi.

"Participation aux frais : 6 F."

### L U K S E M B U R G I A V E S P E R O

En rilato kun la Kongreso de U .F .E . kaj Eùropa Kongreso.

VENDREDO 16 an de FEBRUARO 1 9 7 3 a je la 19 a. Gare Saint-Lazare. Galerie des Marchands -Salle du Photo-Club SNCF.

-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-

La kvindek unuaj aliĝintoj el la Pariza Federacio al la Nacia Kongreso ricevos valoran memoraĵon !!!

**1 9 7 3**

Jen kelkaj versoj de ludo kiu okazis en kabaredo "La Tri Koboldoj". La aùdantoj proponis rimojn laù elektita temo. Tuj poste la kanzonisto verkis kaj kantis la kanzoneton :

## O K A Z E D E L A N O V A J A R O

( Melodio : " Abio, vi .... " )

La Nova Jar' - sen retorik' -
Signifu bonan trafon !
Ĝi pezu malpli ol pumik' ,
Ĝi pasu kiel amleter' ,
Kaj neĝe falu de l' eter'
Sukero en la kafon !

Por havi panon sur la tabl'
Necesas ankaù plugi ,
Kaj - laù konsilo de l' diabl' -
Se malbeligas vin veruk'
Ĝin kaŝu lerte per peruk'
Por al ĉielo flugi !

Raymond SCHWARTZ

$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$$

## C O T I S A T I O N S 1 9 7 3

Le TRESORIER rappelle aux adhérents que les cotisations sont payables dès maintenant pour l'année 1973. Les membres du groupe de Paris doivent payer au trésorier du groupe (Groupe Espérantiste de Paris CCP 806 266 -Paris), les membres des groupes de banlieue dans leur groupe respectif .Les autres membres doivent payer à la Fédération Parisienne Espéranto : CCP 10482 04 -Paris.

Dans le tableau ci-dessous, vous remarquerez qu'il existe également une cotisation à bas prix (8 F.), qui permet de nous aider à accroître le nombre de nos adhérents. Nous suggérons à nos membres de l'utiliser soit pour son conjoint, soit pour tout autre membre de sa famille, s'il ne désire pas ou s'il ne peut pas payer deux ou plusieurs cotisations pleines à 38 F.

| | | |
|---|---|---|
| U. F. E. | Membre adhérent . . . . . . . . . . . . . . . . . . . | 8 F. |
| | MEMBRE TITULAIRE. . . . . . . . . . . . . . . . . . | 38 F. |
| U. E. A. | Cotisations s'ajoutant aux précédentes : | |
| | Membre recevant l' annuaire ( M.J. ). . . . . . . | 25 F. |
| | Membre recevant la revue "ESPERANTO" ( M.A. ) . . | 50 F. |

Concernant les moins de 25 ans, voir page 5 les tarifs de J.E.F.O.

%%%%%%%%%%%%%%%%%%%%%%%%%%%%%%%%%%%%%%%%%%%%%%%%%%%%%%%%%%%%%%%%%%%%%%%%%

Nia deĵorantino F-ino Sylvie BONNET estas je via dispono ĉiu matene krom dimanĉe kaj lunde ek de la 9 a ĝis la 12 a .

tel. 770 - 55 - 03 .

Jen jaro jus finiĝis per du kunvenoj neordinaraj organizitaj de niaj japanaj samideanoj el Oomoto kaj Universala Homama Asocio; ĉiun el ili ĉeestis ĉirkaŭe pli ol ducent personoj: kuraĝiga signo de revigleco! Ĉu ne estus ideale, se de tempo al tempo ni povus tiel prezenti apartan kulturon de la homara familio?

Dum la Zamenhofa Vespero tri literaturaj verkoj estis prezentitaj al via scivolemo; kaj sendube pluraj el vi malkovris antaŭe nesupozeblajn aspektojn sur tiu ĉi ne sufiĉe konata kampo de niaj verkistoj.

Ĉiumerkrede okazas la konversacia rondo, kiu ebligas al novaj membroj pli familiariĝi kun la lingvo kaj al la malnovaj aktive partopreni en diverstemaj debatoj. Tamen ni substreku, ke la ĉeesto de la plej lertaj geesperantistoj ĉiam estas pli ol bonvenaj por animi la diskutojn. Cetere du kursoj nuntempe preparigas novajn aliĝontojn al la grupo; kaj estus dezirinde, ke kelkaj ne neglektu ilian akceptadon inter ni: amikaj ligoj, jen la cemento por konstrui la grupon!

Nun alvenas nova jaro 1973: ĝi fariĝos, kia ni -ĉiuj- faros ĝin! Mi uzas la okazon ĉe la januara sojlo por prezenti al ĉiuj membroj tre korajn bondezirojn de bonfarto kaj de bona prospero por vi kaj via poresperanta aktiveco.

La prezidanto: Jean THIERRY

-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-

La 15. de decembro 1972

Laŭtradicie la Pariza Esperanto-Grupo memorigis la naskiĝon de d-ro Lazaro Ludoviko Zamenhof; kaj nia amiko A.Bourdeaux protokolis tiun bonan kunvenon (vidu sekvantan paĝon).

Sekve de kolokvo de la neregistaraj organizoj en konsultaj rilatoj kun Unesko la prezidanto uzis la okazon por raporti pri la elvokitaj kaŭzoj de la nelegemo en la mondo.

La plej ofte antaŭmetataj argumentoj estas la manko de tempo kaj la multekosteco de la libroj. Sed neniam antaŭe kiel nun tiom da homoj ĝuis tiom da libera tempo, kaj la plimulto el la libroj ne pli kostas ol tuttaga promenado en aŭtomobilo tra la benzingasoj. Kio montras, ke verfakte oni eluzas la tempon per elekto de aliaj preferataj aktivecoj: kinarto, televido, sporto kaj precipe aŭtomobilado...

Pluraj antaŭjuĝoj de longe kontraŭas al la legado, interalie: ia familia edukiteco tendencas konsideri la tempon dediĉitan al legado kiel nuran tempon perditan; tro multaj konservas pri la legado unu malagrablan memoraĵon de nur lerneja tasko. Kio entute kulpigas la instrumetodon de lernejoj.

Efektive, legi kun profito kaj plezuro, tio signifas ne nur scipovi ja sen peno deĉifri la lingvan kodon, sed ankaŭ kompreni la esprimitajn ideojn en la kadro de iu kunteksto; tio signifas plie diskuti ilin, do prijuĝi kaj la enhavon kaj la formon. La spertoj de nuntempaj ekzamenoj eĉ super la abiturienta nivelo montras, ke ankoraŭ tro da kandidatoj ne kapablas resumi dudek liniojn da teksto, ilin titoli kaj el ili eligi valoran temon por debato! Jen sendube en kio kuŝas la vera kaŭzo.

Des pli prave, kiam temas pri lernota lingvo! Kiu ne legas, tiu malfacile povas mastri lingvon, ĉar nur la skriba estas sufiĉe fiksa por doni precizecon al la pensado. Sed neniam estas tro malfrue por komenci: ĉio estas nur afero de alkutimiĝo por akiri "duan naturon".

-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-

## PASINTAJ KUNVENOJ

DUA JAPANA VESPERO EN MUZEO GUIMET -(15an NOV 1972)- La dua japana vespero organizita de Oomoto tenis la promeson de la unua en kiu pli ol 200 esperantuloj el Parizo kaj suburbo partoprenis. La proponita programo enkondukita de S-ro Deguŝi, helpe de S-ro Uméda kaj de nia amiko Jean Thierry por la tradukado, promenis nin en la estinteco kaj estanteco de tiu popolo, kies gastameco kaj disciplino estas kvazaŭ legenda. De la prezentado de tipaj muzikinstrumentoj (Kotoo, iuspeca harpo, tamburo, fluto) al tiu de la "teceremonio", de la NO-dramoj al la neforgeseblaj travivaĵoj de la Universala Kongreso en Tokio, la spektintoj momente forgesis la trepidantan vivon en nia ĉefurbo por ĝui la kvieton de la japanaj pejzaĝoj! (verdire, la vivo en Tokio estas pli terura ol tie, laŭ multaj atestantoj!).

Surprizo atendis ĉiujn: la donaco al ĉiu partoprenanto de unu rizograjno sur kiu estis gravurita, en ideogramoj, la frazo :"la mondo estas unu". Ĝi estu por ĉiu, kiu ĝin ricevis, talismano kaj memoraĵo de niaj japanaj amikoj!

Notinde estas ke, ĉiumerkrede kaj ĉiusabate posttagmeze oni povis partopreni la "teceremonion" en Muzeo Cernuschi, kie okazis ĝis fino de decembro la ekspozicio "Onisaburo kaj lia skolo" . "Le Figaro", "Le Monde", "L'Aurore" kaj "Connaissance des Arts" raportis pri tiu ekspozicio.

A. Bourdeaux

ZAMENHOFA VESPERO - (15an DEC 1972) - Ĉijare ankoraŭ estis respektita la tradicio laŭ kiu, dank'al la poeto Julio Baghy, la 15-an de decembro, naskiĝdato de L.L.Zamenhof, estu la "Libro-Tago".-50 personoj partoprenis tiun interesplenan vesperon en la sidejo de la francaj fervojistoj, rue d'Athènes.

S-ro Thierry, prezidanto de la Pariza Grupo enkondukis la temon per trafaj konsideroj rilate la ĝeneralan nelegemon de la publiko kaj tute speciale de la esperantistaro! (vidu ĉe la paĝo 3a).

S-ino Hélène Mousset lerte kaj vivante prezentis konatan pecon de nia literaturo, "Vivo kaj Opinioj de Majstro M'Saud"de Ribillard (1904-1962), tiu fama esperantoparolanta...azeno!

S-ro Roger Bernard, sekretario de la Akademio, mondkonata tradukanto de verkoj de Sartre, post konsideroj pri la tradukarto kaj ĝiaj malfacilaĵoj, reliefigis per poemo (jam deklamita lastan jaron de J. Thierry) la nekredeblan nelegemon de la esperantistoj kiuj facile fanfaronadas pri la facileco de la lingvo kaj la riĉeco de ĝia literaturo. Li eltiris tradukekzemplojn el "Apenaŭ unu bukedeto" kiun li verkis antaŭ kelkaj monatoj - Bukedeto de poemoj kiuj estas juveloj de nia franca literaturo kaj kiujn li sciis reliefigi la belon kaj la ritmon en esperanto.

S-ro Thierry prezentis "Kiel akvo de l'rivero" de Raymond Schwartz (substrekante ke la libro estis finpresita la 29-an de decembro 1962 kaj ke la 1-a eldono ankoraŭ ne estas elĉerpita!). Kion diri pri tiu romano, unika en nia literaturo, kvankam ekzistas pluraj romanoj konataj kiel "Viktimoj" de Baghy, "Abismo" de Forge ktp Ĝi estas ne nur interesa, sed ja pasiiga kaj pro la rakonto mem kaj pro la mirinda arto de aŭtoro. Kaj S-ro Thierry malkovrigis al ni la diversajn facetojn de la talento de Schwartz en tiu romano kiu disvolviĝas de 1913 ĝis 1946. La renkontiĝo de l'ĝendarmoj kun Bignol, la renkontiĝo de l'geedziĝa parado kun la bovinoj, la ŝanĝo de la loknomoj, la vortludoj kaj kontraŭknaloj, la emocio de dramaj situacioj.

Espereble, niaj tri amik(in)oj sukcesis doni al la ĉeestintoj la emon legi aŭ relegi tiujn tipajn verkojn de nia tiel malbone konata esperanto-literaturo.

S-roj Doury kaj Peray regalis ĉiujn per honora vino (post lotumado de libroj akireblaj ĉe la sidejo de U.F.E.).

A.B.

""""""""""""""""""""""""""""""""""""""""""""""""""""""""""""""""""""""""""""""""""""

## NEKROLOGIO

- S-ino Jean SERRE mortis la 31-an de Julio 1972 .
- S-ro Gabriel CHAVET mortis la 23-an de Oktobro 1972. - 91-jaraĝa li estis aŭtoro, inter aliaj, de "ESPERANTO-MANUEL" . Li partoprenis la organizadon de la Unua Universala Kongreso en 1905.

""""""""""""""""""""""""""""""""""""""""""""""""""""""""""""""""""""""""""""""""""""

Eble vi estis pli malpli surprizitaj ricevi senpage Federacian Bultenon. Efektive, ĉar ni estas nova grupo, ke ni ĵus naskiĝis, ni ne povis peti monon de niaj anoj. Sed baldaŭ estos 1973!... (Tia rilate, mi bondeziras al vi bonegan kaj fruktodonan jaron!....) Vi do devas aliĝi al J.E.F.O (Junulara Esperantista Franca Organizo) kaj tiel sen krompago ricevos "Federacian Bultenon". Jen la diversspecaj kotizoj:

1) Membre adhérent de l'UFE et JEFO et de l'UEA et TEJO (ne reçoit pas "Koncize").
1-a) Membre recevant en plus "Koncize".
1-b) Membre recevant en plus "Koncize" et "Kontakto".

2) Membre titulaire ou Junior (reçoit "Franca Esperantisto"et "Koncize").
2-a) Membre recevant en plus "Kontakto".

3) Membre individuel de l'UEA et de TEJO (reçoit "Franca Esperantisto" "Koncize" et l'annuaire de l'UEA (J-MJ) ou (MJ)).
3-a) Membre recevant en plus "Kontakto" (J-MJ ou MJ).
3-b) Membre recevant en plus "Kontakto" et la revue "Esperanto" (J-MA ou MA-K).

| Type | Etudiant ou jeune moins de 22 ans | Etudiant ou jeune jusqu'à 25 ans | Etudiant de plus de 25 ans |
|---|---|---|---|
| 1 | 8,- Fr | 8,- Fr | 8,- Fr |
| 1-a | 11,- Fr | 11,- Fr | 11,- Fr |
| 1-b | 19,50 Fr | 19,50 Fr | 24,50 Fr |
| 2 | 23,- Fr | 38,- Fr | 38,- Fr |
| 2-a | 31,50 Fr | 46,50 Fr | 51,50 Fr |
| 3 | 35,50 Fr | 63,- Fr | 63,- Fr |
| 3-a | 44,- Fr | 71,50 Fr | 76,50 Fr |
| 3-b | 60,50 Fr | 88,- Fr | 101,50 Fr |

Tous les membres reçoivent la carte de l'UEA et les coupons donnant droit aux services des délégués, ainsi que le bulletin trimes--triel: "Espéranto Actualités".

Que vous soyez étudiant ou que vous n'ayez pas plus de 25 ans, votre cotisation est à adresser au CCP de JEFO: "Organisation de la Jeunesse Espérantiste Française", 34, Rue de Chabrol, 75010 PARIS.

C.C.P 31 709 94 La Source.

N'oubliez surtout pas d'indiquer votre date de naissance. Si vous êtes étudiant, indiquez également ce que vous étudiez et dans quel établissement. Dans ce cas, vous serez automatiquement membre de SFELO (Ligue des Etudiants Espérantiste Français) qui est une section de JEFO.

/%/%/%/%/%/%/%/%/%/%/%/%/%/%/%/%/%/%/%/%/%/%/%/%/%/%/%/%/%/%/%/%/%/%/%/%/

NOVAĴOJ....

+ Ĉiumerkrede, okazas kursoj kun ĉirkaŭ 24 lernantoj, en tiu kelo pretigi--ta dank'al via helpo.

+ Paska Kultura Semajno okazos en la kastelo de Grésillon de la 11-a ĝis la 18-a de aprilo 1973. Temo: "Kunvivado".

## - LERNJARO 1971 - 1972 - REZULTOJ DE LA EKZAMENOJ - PARIZA REGIONO -

Aldono al la listo de la bulteno N° 2

ATESTO PRI PRAKTIKA LERNADO -S-ino BARBÈ Lucette

ATESTO PRI KAPABLECO - S-ino HOULGATTE Andrée - Nun ni povas starigi statistikon :

ATESTO PRI SIMPLA LERNADO.......... 22
ATESTO PRI PRAKTIKA LERNADO ...... 7
ATESTO PRI KAPABLECO ............. 2
Entute ...... 31 sukcesintoj

Gratulojn al ĉiuj !

Ĉu la sumo de la sukcesontoj 72-73 estos pli granda ?
Tio dependas de la kuraĝo de la gelernantoj . Do ... NI LABORU !!!

## E N   L A   P A R I Z A   R E G I O N O

- En novembre dernier avait lieu à Neuilly-sur-Seine le deuxième Salon International des Loisirs de l' INTERNATIONAL POLICE ASSOCIATION ( I P A ) qui groupe 100 000 membres répartis dans 48 pays. Pour devise l' IPA a choisi l' Espéranto : " SERVO PER AMIKECO " .La policistoj estas simpatiaj homoj. Ĉu ne ?

---

- Dans la revue parisienne " CARREFOURS NORD-EST " nous avons lu le texte suivant dont le titre était en Espéranto : KUTIMA MESO POR LA MORTINTOJ

" Une personne de la rue de Chabrol a été, pendant de longues années, l'active se-
" crétaire de l'Union française pour l'Espéranto. Pour le repos de son âme, une
" messe, à laquelle assistaient une centaine de personnes, a été célébrée dans cette
" langue internationale à Saint-Vincent-de-Paul, par un prêtre d'Anjou, le 29 Sep-
" tembre 1972. C'est sans doute la première messe dite en espéranto à Paris !

---

- En loko de la Civitanoj de l'Mondo, 15, rue Victor Dury -Parizo- ek de 15 novembro okazas 1a-grada kurso de Esperanto .

---

- Naù lernantinoj de la lernejo "rue Jenner - Paris -13e" faris tiun ĉi raporteton:

VIZITO DE JAPANA PROFESORO .

" Lundon la duan de oktobro post la klaso, dum la esperanta kurso, profesoro ve-
" ninta de Japanio, vizitis nin. Li loĝas en la nordo de la centra insulo, en Kuĵi.
" Li parolis al ni en Esperanto, kaj li demandis al ni niajn nomojn kaj niajn aĝojn.
" Li havas du infanojn :Takeŝi 5 jaran filon kaj Jasuŝi 2 jaran filon. Ni kantis en
" Esperanto : "Se mi estas riĉa", "Malgranda urso", "Kolomb' sur tegment'".. Li ler-
" nigis al ni kanteton :"dek boteloj". Li fotis nin. Ni montris al li pentritan
" bildon pri la vulpo kaj la korvo, kun fablo skribita en Esperanto. Ni donacis al
" li diskon pri nederlandaj kantoj. Li estis tre kontenta. Paroli kun eksterlanda
" persono ravis nin.

(Patricia, Françoise, Florence, Frédérique, Sylvie, Sophie, Maria, Laurence, Agnès)

## ------- K A L E N D A R O ------
## 1 9 7 3

- 12an de Januaro- Trireĝa kukokunveno ( vidu ĉe la paĝo 1a )
- 13an de Januaro - Estrara kunveno, ĉe Chabrol, je la 14.45 H.
- 10an de Februaro - Estrara kunveno, ĉe Chabrol, je la 14.45 H.
- 16an de Februaro - Luksemburgia Vespero ( vidu ĉe la paĝo 1a )
- 17an de Marto - Konsilia Kunveno, ĉe Chabrol, je la 14.45 H. -Iu ajn membro rajtas partopreni kiel observanto.
- Dimanĉon 29an de Aprilo : FEDERACIA KONGRESO EN PARIZO .
- 8. - 11 Junio - En Luksemburgo : Nacia Franca Kongreso kaj Eùropa Kongreso.

KONSILO : Ricevante informon pri kunveno tuj ni notu la daton sur nia kalendaro. Se por kunveno estas necese ke ni registrigu nin antaù preciza dato, ankaù ni notu tiun ĉi daton. O f t e  n i  t r a r i g a r d u  n i a n  k a l e n d a r o n!

oooooooooooooooooo
oooooooooooooooo
ooooooooooooooo
oooooooooooooo
ooooooooooo
oooooooo